

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

MONDA KOMUNIKA
JARO

•
ALTA REKONO

•
IFEK-KONGRESO
ATENDAS NIN!...

•
KIK — REALIGITA


•
KUN JUNULA
VERVO

•
NIA UNUA GASTO
EL MALTO

•
LA PLEJ BONA
DONACU

•
EKSTERLANDANOJ
PRI PISANICA

•
LINGVAJ
PROBLEMOJ



MONDA KOMUNIKA JARO KAJ MALŜLOSILOJ AL KOMUNIKADO

R. E. BUTLER
Gen. sekretario de ITU

Foje iu diris, ke komunikado estas la komenco de ĉia interkompreno. Tiu diraĵo bone povus esti devizo kaj por Universala Esperanto-Asocio (UEA), kaj por Internacia Telekomunika Unio (ITU).

Jam de sepdek kvin jaroj via Asocio senlace klopodas ampleksigi internacian komunikadon kaj interkomprenon, kaj interproksimigi la popolojn de la mondo per komuna lingvo.

Interkomunikado estas ŝlosila faktoro en la socia, ekonomia kaj kultura evoluo de la nacioj kaj por kompreno inter la popoloj. Kiel ofte lingvaj baroj kaŭzas miskomprenojn inter popoloj kaj nacioj — kaj tio okazas spite al senprecedenca teknologia evoluo kaj ties aplikado por tuja komunikado tra la mondo.

Dum UEA provas venki lingvajn barojn por komuniki inter malsamaj nacioj kaj popoloj per la uzo de universala lingvo, ni, ITU, per teknologiaj rimedoj strebas transsalti la distancojn kaj nuligi vojaĝtempon.

ITU estis nomita de la Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel la gvida organizado por aktivado de la Unuiĝintaj Nacioj kaj ties Specialaj Organizaĵoj rilate al la Jaro. Ĉi-loke mi aparte ŝatus varme aplaŭdi la ambician programon de via Asocio, kiu fondos fakterminaron por komunika teknologio. Mi estas certa, ke tiu entrepreno havos sekvojn, kiuj multe plibonigos la skribadon en Esperanto kaj esperantigon de tekstoj pri komunikado.

La Monda Komunika Jaro tamen ne estas nur agado, kiu okazas sur la nivelo de internaciaj organizaĵoj, sed ĝi intime koncernas tion, kio okazas sur nacia nivelo, ĉar la celo estas finfine plibonigi la aliron al komunikado por la ordinara homo.

La lingvo estas necesa elemento en la komunikado. Kiel multe pli bona estus tergloba interkompreno, se ni havus unu solan lingvon!

Kiel multe pli facile kaj malmultekoste estus, se ni havus nur unu solan komunan lingvon. Eĉ nun, kun la uzado de ses aŭ sep lingvoj, en variaj gradoj, en la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj ankoraŭ troviĝas multaj gravaj lingvaj grupoj, kiuj devas uzi fremdan lingvon por komuniki en konferencoj kaj kunvenoj. Jen la graveco de la laboro, kiel tiu de via Asocio, por progresigi komunan lingvon.

Unu el la fruaj oficialaj rekonoj de Esperanto estis de Internacia Telegrafa Unio. Estas

tre bela koincido, ke estis hungara propono, kiu rezultigis, ke la Internacia Telegrafia Konferenco, kunvenanta en Parizo, en 1925, akceptis Esperanton kiel t. n. „klaran“ lingvon por la internacia publika telegrama servo.

Tio estis mejloŝtono kaj ĝi konservis la uzon de Esperanto por komunikado inter homoj, sed vi ĉiuj scias, ke ni nun vivas en mondo, kie lingvoj ekz. specialcelaj lingvoj, ofte bazitaj sur natura lingvo, estas uzataj por direkta maŝinoj.

Venos tempo, kiam interparolado inter homoj kaj maŝinoj devos esti bazita sur pli universala kaj pli sisteme strukturita lingvo, ol la lingvoj, kiujn ni kutime uzas.

Vi komprenas, ke mi ne povas sugesti, ke tiun funkcion transprenu Esperanto, sed mi ja rekonas, ke Esperanto havas unikan pozicion inter la internaciaj lingvoj.

Mi ne scias, ĝis kiu grado vi jam pensas pri la uzo de Esperanto por hom-maŝinaj dialogoj en la reala kunteksto de la novaj internaciaj komunikaj servoj.

Vi, tamen, estas la ekspertoj. Vi unuiĝis ĉi tie por konsideri la utilon kaj la teknikajn aspektojn de la uzado de Esperanto en la hodiaŭa mondo, kio implicas uzadon ankaŭ en la mondo de modernaj telekomunikado kaj komputiloj. Vi scias la potencialon, kaj mi supozas, ankaŭ la malfacilojn esence proprajn al la uzado de Esperanto en hom-maŝina kunteksto. Sed mi ja sentas, ke vi ĉiuj, via Asocio kaj la vasta anaro de esperantistoj tra la mondo povas fari tre konsiderindan kontribuon al la antaŭdiskuto de tio, kio sendube iĝos afero de konsiderinda intereso, se — kiel oni devas supozi, se oni kredas je teknika novigado — la hom-maŝina dialogo iĝos grava faktoro en la internacia komunikado kaj transsendado de informoj.

La konsiderinda nombro de partoprenantoj de via 68-a Kongreso, kiu prezentas plian agrablan koincidon de Hungario, UEA kaj la Monda Komunika Jaro kaj sekve ankaŭ ITU, certe ebligas al vi solvi la gravan taskon, kiun vi difinis al vi.

Budaĉesto,
31-a de julio 1983

(El la raporto, farita ĉe
la solena malfermo de la
68-a UK de UEA)



BULGARA E SPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

J A R O 52

NOVEMBRO

11 • 1983

POR TRANSIRI RUBIKONON...

Jam du jarojn ni havas la eblecon instrui Esperanton en la mezgradaj lernejoj en nia lando (laŭ decido de la Ministerio de Popola Klerigo). Dum tiu periodo oni multon faris por varbi en la medio de profesiaj instruistoj kursanojn por la instruistaj E-kursoj, kiuj poste instruus Esperanton en la lernejoj. Dum la unua lernojararo pri Esperanto okupiĝis 1687 gelnantoj el 98 klasoj, kaj dum la dua lernojararo (1982) — 1785 gelnantoj el 91 klasoj. Komparante la ciferojn, oni povas konstati, ke ili nur iom diferencas. Fakte ili estas pli grandaj, ĉar ne ĉiuj distriktaj estraroj sendis al la Instruista Sekcio ĉe BEA raporton pri la instrulaboro en sia distrikto.

Dum la pasinta lernojararo la nombro de la novaj esperantistoj — profesiaj instruistoj, kiuj studis Esperanton en 1-a, 2-a kaj 3-a gradoj en 13 urboj, kaj ankaŭ en Bankja (sub la aŭspicio de la Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj — filio de la Ministerio de Klerigo) plialtiĝis. En la 20-tagaj specialaj porinstruistaj E-kursoj, en aŭgusto ĉi-jare en Pisanica, Esperanton studis kaj ekzamenigis 90 geinstruistoj en ĉiuj kvar gradoj. Do, la nombro de la profesiaj E-instruistoj ĉi-jare denove kreskis kompare kun la pasinta lernojararo. Tamen oni ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon pri profesiaj E-instruistoj en la lernejoj. Ĉiam ankoraŭ ne en ĉiu lernejo estas instrupreta profesia E-instruisto! Nia plej glava celo devas esti: lige kun la 100-jariĝo de Esperanto (1987), la Internacia Lingvo estu instruata en ĉiu mezlernejo en nia lando!

Estas interesa la fakto, ke multaj el la kursanoj-profesiaj instruistoj dum la pasinta lernojararo fervore lernis la lingvon sinsekve, sen interrompo en 1-a, 2-a kaj iuj eĉ en 3-a grado. Tio estis precipe instruistoj-filologoj.

Eble jam estas tempo prizorgi la instruadon de Esperanto en universitatoj kaj superaj lernejoj ankaŭ en nia lando! Tio devas esti la plej grava tasko de la Instruista Sekcio ĉe BEA, kiuj faru la necesajn paŝojn, por ke Esperanto estu

instruata almenaŭ en la Sofia Universitato, en la Katedro de Intertingvistiko (kiel aldona, tria fakto en la Filologia Fakultato).

Sed paralele kun la preparo de profesiaj E-instruistoj oni devas zorgi ankaŭ pri instruhelpiloj kaj unualoke pri taŭgaj lernolibroj, konformaj al la aĝo de la lernantoj — ekzemple oni devas verki lernolibrojn por lernantoj de la 1-a ĝis la 4-a klaso, de la 5-a ĝis la 8-a klaso, de la 9-a ĝis la 11-a kaj 12-a klasoj. Oni devas verki ankaŭ lernolibron por infanoj en infangardenoj. Sed, bedaŭrinde, ankoraŭ malmultaj estas la spertaj E-instruistoj-filologoj, kiuj havas la kuraĝon verki similajn lernolibrojn. . . Do, niaj esperoj estas adresitaj al la novaj profesiaj E-instruistoj-filologoj, kiuj dank' al sia sperto pri instruado de fremdaj lingvoj, eble pli sukcese solvos en proksima tempo tiun ĉi gravan taskon!

La instruado de Esperanto en lernejoj ne devas diferenci de la instruado de la aliaj fremdaj lingvoj. Ekzemple, por la instruistoj de fremdaj lingvoj en la lernejoj la Ministerio de Klerigo eldonas specialajn gvidlibrojn, kaj por la instruistoj de Esperanto nur en la komenco de la nuna lernojararo la Ministerio aperigis la „unuan hirundon: „Gvidlibro por la E-instruisto“ (komuna verko de du spertaj esperantistoj). Tamen tio ne sufiĉas! Oni devas prizorgi ankaŭ la aperigon de aliaj helpiloj, ekz. bildoj, tabeloj, gramojondiskoj aŭ surbendigoj ka.

Konklude oni povas diri, ke la E-instruado en lernejoj kaj la preparo de profesiaj E-instruistoj en nia lando bone prosperas, sed oni devas ankoraŭ multon fari por atingi novajn pli grandajn sukcesojn.

Antaŭ ni estas Rubikono, kiun ni nepre devas transiri. Kaj eble post kelkaj jaroj oni komencos instrui Esperanton en niaj lernejoj laŭ sugestopedia metodo. . . Kial do ne!

MARIN BĂCEV,
ĉefa metodikisto ĉe BEA

ALTA REKONO



Lige kun lia 75-jariĝo, kiel rekono por lia konsekvenca antifaŝista batalo kaj pro lia utila kaj sindona agado kiel kulturaganto kaj sociaganto post la venko super la faŝismo, Hristo Gorov, prezidanto de BEA, per dekreto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario estas distingita per la alta ŝtata titolo „Heroo de Socialisma Laboro“.

Hristo Gorov estas eminenta aganto de la bulgara kaj internacia E-movado, prezidanto de la Bulgara Esperantista Asocio kaj membro de la Komitato de UEA.

Li naskiĝis la 18-an de julio 1908 en vilaĝo Gorno Brodi, distrikto de Ser (nun en Greklando). Dum la Balkana Milito (1913) la vilaĝo estas forbruligita kaj la familio de Hristo Gorov fuĝas al Bulgario. Pro la mizero, en kiu vivas lia familio, li forlasas la lernejon kaj komencas labori kiel tabaklaboristo en Asenovgrad. Dum la Septembra Ribelo 1923 li plenumas la taskojn de kuriero. Kelkajn jarojn pli malfrue la juna laboristo estas jam en la vicoj de la Laborista Partio kaj de la eksterleĝa Bulgara Komunista Partio.

Jam kiel junulo Gorov eklernas Esperanton, manifestas grandan intereson al la literaturo kaj mem komencas verki en Esperanto. Liaj unuaj du tradukoj kaj la originala verko „La agloj“, kiujn li sendas al Teo Jung en Germanio, aperas en „Heroldo de Esperanto“ kaj „Verda

Stelo“ en 1928—1929. En 1929 li kunlaboras al „Esperanto“, al „Esperanto-Praktiko“, al „Bulgara Esperantisto“; en 1930—1931 — al „Sennaciulo“ kaj „La Nova Epoko“. La pariza filio de SAT eldonas en aparta libro lian unuan ampleksan poeziaĵon „Poemo de l'plugisto“, inspiritan de la Septembra Ribelo; en 1932 Gorov aliĝas al la Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE) kaj kunlaboras al „Internaciisto“ kaj „Sur posteno“. En „La Nova Epoko“ aperas liaj poemoj „Post la fronto kaj „Fabelo pri l'rivero“; eldonejo EKRELO eldonas novelojn de Hristo Gorov en aparta libro — „Ĉe abismo“. En la sama eldonejo aperas ankaŭ la poemo „Septembro“ de Geo Milev, tradukita en Esperanton de Hristo Gorov kaj David Sasnov.

Hristo Gorov aktive partoprenas la laboristan klasbatalan movadon kaj ankaŭ la fondon de BuLEA en 1930. Ĉe la eldonejo de BuLEA aperas lia novelo „Du frontoj“. Dum tiu periodo Hristo Gorov multe tradukas el la bulgara lingvo. Liaj preferataj poetoj estas P. Javorov, Hristo Smirnenski, Hristo Jasenov, kaj verkistoj — Jordan Jovkov kaj Georgi Karaslavov.

En 1931, jam taksata kiel avangarda verkisto, Hristo Gorov, kune kun Asen Grigorov, estas invitita partopreni la fondon de la Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantistaj Verkistoj (IAREV).

Paralele kun sia tiel fruktodona literatura aktivado, Hristo Gorov daŭrigas ankaŭ la antifaŝistan laboron. En 1934 al li estas komisiite redakti la nelegalan gazeton „Sturmulo“ — organo de la sekcio de BuLEA en Plovdiv. Ĝi aperas ĝis majo 1935, kiam la polico malkovras la presejon kaj arestas la eldonantojn. Pli ol du jarojn Gorov restas en malliberejo, kie kune kun Nikola Aleksiev kaj aliaj politikaj malliberuloj-esperantistoj, eldonas manskribitan gazeton en Esperanto.

Post la amnestio en 1937 Gorov denove okupigas pri poresperanta kaj literatura laboro. Li tradukas rakontojn de J. Jovkov, verkas la poemon „Sen laboro“, kunlaboras al la bulgarlingvaj gazetoj „Zarja“, „Jug“, „Sofio“, „Novini“.

Dum la periodo de armita batalo kontraŭ la faŝismo Hristo Gorov estas sekretario de regiona komitato de BKP en Plovdiv kaj pli malfrue gvidas la presfakon ĉe la Distrikta Komitato de la partio en Plovdiv. Li redaktas dum tiu periodo la eksterleĝan gazeton „Oteĉestven Glas“ — organo de l'Distrikta Komitato de la Patrolanda Fronto. Kiel membro de

la stabo de Unua Rodopa Partizana Brigado, Gorov redaktas ĝian organon „Ribelula Batalo“. Liaj multnombraj partizanaj pseŭdonimoj — Zarko, Slavjanski, Tr. Lipov, Minko Bezovski, Katjuŝin k.a. — staras sub multaj artikoloj, alvokoj kaj raportaĵoj, publikigitaj en la nelegala ribelula gazetaro.

Post la Naŭa de Septembro 1944, dum la jaroj de la popola regado Ĥristo Gorov fordonas ĉiujn siajn fortojn kaj entuziasmon al konstruado de la socialisma socio. Kaj kiel sekretario de la Urba kaj Distrikta Komitato de BKP kaj ĉefredaktoro de „Oteĉestven Glas“, kaj kiel vicĉefo de fako „Propagando kaj agitado“ de CK de BKP, kaj kiel estro de la kultur-kleriga fako ĉe la Ministra Konsilantaro, li energie kaj sindone laboras por triumfo de la partiaj ideoj.

Dum pli ol 25 jaroj Gorov laboras kiel ĉefredaktoro en Bulgara Kinematografio kaj en la Studio por Dokumentaj Filmoj en la Kine-

matografio de la Popola Armeo. Li estas aŭtoro de pli ol 20 scenaroj de dokumentaj filmoj kaj noveloj kaj de vico da libroj, inter kiuj „Tiel pereis la komisaro“ (taglibro de partizana komandanto), „La vojo al la venko“, „Fidelaj ĝis morto“, „Montaraj agloj“, „Tunelo sub la malliberejo“ (taglibro de politika malliberulo), la partizana taglibro „Kroniko de unu somero“ k.a.

Se ni dezirus karakterizi Ĥristo Gorov kiel kreaĵon personecon, partian funkciulon, kiel publiciston, aŭtoron, redaktoron kaj tradukiston, ni ne povus preterlasi la plej gravan trajton en lia vojo de batalanto kaj kreanto — lian neŝanceleblan kredon kaj sindonemon al la partio kaj la popolo.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kaj ĉiuj bulgaraj esperantistoj elkore gratulas sian estimatan prezidanton pro la alta rekono kaj deziras al li sanon, energion kaj pluan fruktonan aktivadon en lia literatura kaj poresperanta laboro.

SALUTLETERO DE TODOR ĴIVKOV

*Al k-do Ĥristo Gorov
prezidanto de
Bulgara Esperantista Asocio*

Kamarado Gorov,

Mi havas la plezuron elkore saluti vin okaze de via distingo per la titolo „Heroo de Socialisma Laboro“ kaj lige kun via 75-jariĝo.

Tiu ĉi distingo estas plia rekono por vi — la konsekvenca antifaŝisto, pasinta tra la fajro de la Septembra Ribelo 1923, tra la nelegala batalo de la partio, tra la faŝistaj malliberejoj kaj la partizanaj batalvicoj. Post la venko super la faŝismo, kiel kultura aganto kaj sociaganto, vi ĉiam tiel abnegacie fordonas viajn fortojn por la triumfo de la granda komunista idealo.

Mi sincere bondeziras al vi sanon, feliĉon kaj sukcesojn.

20. 7. 1983

T. JIVKOV



Honora prezidantaro de la solenaĵo. Parolas N. Aleksiev.

„GRATULOJN, KARA PREZIDANTO!...“

La 28-an de septembro j.k. en la salono de la sofia legejo „Emil Sekerĝijski“ okazis solena celebrego de k-do Hristo Gorov, prezidanto de BEA, lige kun lia 75-jara jubileo kaj lia honorigo per la alta ŝtata titolo „Heroo de Socialisma Laboro“.

La salono estis plena de esperantistoj el Sofio kaj el multaj aliaj loĝlokoj de nia lando, kiuj venis por esprimi sian estimon al nia ŝatata kaj atestimata prezidanto. Oficialaj gastoj de la solena kunveno estis s-ino Flora Szábo, ĝenerala sekretario de UEA, Dimităr Andreev el Asenovgrad, malnova amiko kaj kunaganto de Hristo Gorov, Tinka Lakova, unu el la fondintoj de BuLEA, Bojĉo Mladenov, vicprezidanto de DE de BEA en Vraca, Fani Miĥajlova, sekretario de DE de BEA en Plovdiv kaj Zora Oŝanska, sekretario de la Sofia Urba Estraro de BEA.

La solenaĵon malfermis k-do Nikola Aleksiev, Heroo de Socialisma Laboro kaj honora prezidanto de MEM.

Festparoladon pri la vivo kaj agado de k-do Gorov faris la vicprezidanto de BEA Petăr Todorov. Todorov emfazis la multjaran sindonan laboron de Hristo Gorov en la vicjoj de la batalantoj kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo kaj lian riĉan kontribuon al la internacia laborista movado pere de liaj originalaj E-versaĵoj, tradukoj kaj aktiva kunlaborado al la esperanta kaj bulgarlingva gazetaro. Vivo, dediĉita al la popolo kaj al Esperanto — la lingvo de paco, amikeco kaj interkompreniĝo inter la popoloj.

Nikola Aleksiev tralegis dekreton de la Stata Soveto de PR Bulgario pri la honorigo de Hristo Gorov per la alta titolo „Heroo de Socialisma Laboro“ kaj ankaŭ salutleteron al la jubileulo de la ĝenerala sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de la Stata Soveto de PR Bulgario Todor Jivkov.

Petăr Todorov transdonis al k-do Gorov Salutleteron de la Centra Estraro de BEA.

Sekvis salutparolo de Flora Szábo, kiu diris: „... nur antaŭ kelkaj minutoj mi eksciis, ke mi havos la plezuron ĉeesti tiun solenaĵon. Mi opinias, ke ne mi estas la persono, kiu povas fari salutparolon pri k-do Gorov, sed mi povas diri, ke mi kunlaboras kun li pli ol 10 jarojn, kaj ĉiam liaj trankvileco kaj saĝo gvidis kaj helpis nin. Mi estas danka pro lia subteno al la tutmonda esperantista movado. Sano kaj ankoraŭ longan kunlaboradon!“

La Distrikta Komitato por Arto kaj Kultu-

ro en Vraca honorigis k-do Gorov per ora insigno kaj diplomo lige kun lia 75-jariĝo kaj pro lia kulturagado. Ilin enmanigis la vicprezidanto de DE de BEA en Vraca Bojĉo Mladenov, kiu tre emocie kaj kortuŝe salutis la jubileulon.

Reprezentantoj de Plovdiv, Asenovgrad, Sumen, Stara Zagora kaj Pleven transdonis salutleterojn kaj donacojn al la prezidanto k-do Gorov. Lin salutis ankaŭ reprezentantoj de la Komitato de Profesiaj Unuiĝoj ĉe BEA, de IEK, de la Centra Mastruma Direkcio, la Medicina E-sekcio, la Societo de Blinduloj, de la E-horo kaj de ĉiuj sofiaj E-societoj.

Fine de la kunveno k-do Gorov rakontis pri sia malfacila vojo, kiel li mem kleriĝis, sekante la vojon de Maksim Gorkij kaj Georgi Dimitrov, kiel per sia persisto kaj propraj fortoj iris antaŭen. Li diris: „... Kiel junulo en la lernejo mi eksentis la klasan rilaton flanke de burĝaj gefiloj. Pro tio mi trovis lokon en la Komsomolo kaj poste en la Komunista Partio, kie oni akceptis min kaj zorgis pri mia eduko... Eĉ por unu momento, eĉ en mia penso mi ne estis ekster la Partio“. Li konfesis, ke dum lia vojo de batalanto kaj poeto gravan rolon ludis sovetiaj verkistoj kaj poetoj kaj la hungara poeto J. Baghy. Li finis per jenaj vortoj: „Mi devas substreki, ke en la bulgara esperantista movado per titolo „Heroo de Socialisma Laboro“ krom mi estis honoritaj gekamaradoj Vasil Bozarov, Nikola Aleksiev kaj Trajana Petkova. Tio signifas, ke nia partio alte taksas la agadon de la Bulgara Esperantista Asocio“.


Post la oficiala parto de la solenaĵo sekvis riĉa belarta programo, preparita de la Urba Estraro de BEA en Sofio. Estis plenumitaj versaĵoj de Hristo Gorov, kantoj laŭ liaj versaĵoj. La programon partoprenis ankaŭ la meritaj aktorinoj el la Stata Junulara Teatro „L. Jivkova“ Conka Miteva kaj Luna Davidova, kiuj, plenuminte en Esperanto versaĵojn de Hristo Gorov, afable sin direktis al li salutante lin, bondezirante longan vivon kaj sanon.

La solenaĵon fermis la Floro de Sofia Esperantistoj per sia kortuŝa kantsaluto al la jubileulo:

„Gratulas ni vin, kara prezidanto, kaj bondeziras sanon kaj sukcesojn!“

KALINKA VASILEVA

KIK — FORĜEJO POR E-FUNKCIULOJ



Partoprenantoj en la Unua Konstanta Internacia Kvalifikejo — KIK, en Varna.

Foto: Ĥristo Metev

Reprezentantoj de la socialismaj Esperanto-asocioj dum siaj pasintaj konsultigoj insiste rekomendis fondon de internacia kursejo, kie — sub la gvidado de spertaj lektoroj — kreskus la kvalifiko de junaj E-funkciuloj. La planoj fine kristaliĝis kaj la nova arango, sub titolo Konstanta Internacia Kvalifikejo — KIK, la unuan fojon estis realigita en la bela bulgara nigramara urbo Varna de la 9-a ĝis la 22-a de aŭgusto j.k., sub la aŭspicio de Bulgara Esperantista Asocio. Rektoro de la Unua KIK estis ing. Milan Zvara el ĈSSR.

Partoprenis ĝin prejparte junaj gefunkciuloj el Bulgario (5), ĈSSR (16), GDR (4), Hungario (7), Pollando (9), kaj Vjetnamio (1). La lektoroj estis el Bulgario (7) kaj el ĈSSR (2).

Antaŭtagmeze oni aŭskultis prelegojn en la aŭditorio de la Maŝinfaka Sipkonstrua Fakultato en Varna.

Varia kaj riĉenhava estis la temaro de la prelegoj, kiuj formis kompletan studprogramon por multflanka kvalifiko de la E-funkciuloj en socipolitika aspekto, samkiel en la sfero de lingvaj kaj agadaj problemoj de la monda esperantistaro.

La elstara bulgara esperantisto kaj socia-

ganto Nikola Aleksiev prelegis pri aktualaj problemoj kaj tendencoj en la internaciaj rilatoj kaj pri la rolo de Esperanto en la pacbatalo. Tre riĉinforma kaj interesa estis lia prelego pri la historio de la laborista E-movado.

La prelegoj de doc. d-ro Vlastimil Novobilski el ĈSSR koncernis la nuntempan lingvan situacion en la mondo kaj la eblecojn de la sociutila apliko de Esperanto en la scienco kaj tekniko. Li klarigis ankaŭ iujn specifajn trajtojn de fakaj E-organizaĵoj kaj institucioj.

Canko Murgin prezentis la biografion de d-ro L. L. Zamenhof kaj koncizan historion de la E-movado. Marin Bâcev, ĉefmetodikisto ĉe BEA, prelegis pri pedagogiaj valoroj de Esperanto kaj pri la problemoj de E-metodiko en la instrulaboro. Prelegon sub titolo „Sciencaj valoroj de Esperanto“ sperte prezentis Ljubomir Mihajlov.

En siaj du prelegoj Dončo Hitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, traktis la principojn de la ĝusta informado kaj argumentado kaj la plej efikajn metodojn por varbado de novaj esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto.

La rektoro de KIK ing. Zvara en siaj prelegoj skizis la specifajn valorojn de la E-movado en

la socialismaj landoj, parolis pri la interrilatoj de UEA kun UNESKO kaj aliaj internaciaj kaj neregistaraj organizaĵoj, pri la kunlaboro inter la socialismaj E-asocioj. Li tuŝis ankaŭ la gravan praktikan pri la problemoj pri trafa elekto kaj preparo de E-funkciuloj.

La eminenta bulgara E-aktoro Anani Anev prezentis referaĵon „1300 jarojn Bulgario“ kaj Dimităr Papazov, sekretario de BEA, skizis la karakterizajn trajtojn de la esperantisto — batalanto por paco, interkompreniĝo kaj socia progreso.

Ĉiu prelego estis kompletigita per vigla diskuto kaj divido de sperto fare de la partoprenantoj. En la kadro de la diskutoj parolis ankaŭ A. Grzebovski el Pollando pri temo „Esperanto kaj turismo“.

Krom la enhavoriĉa instruprogramo, la KIK-anoj partoprenis tuttagan ekskurson al la pitoreskaj ripozlokoj „Oraj Sabloj“, „Albena“ kaj Baĉilk. Ili ankaŭ ĉeestis spektaklon de la opero „Aida“ en la Somera Teatro de Varna. Interesa kaj informoplena estis ilia renkontiĝo kun la distrikta Estraro de BEA en Varna.

Kompreneble, ĉiun sunan posttagmezon la partoprenantoj uzis por sin bani en la refreŝigaj ondoj de la Nigra Maro.

La 21-a de aŭgusto estis dediĉita al la finaj ekzamenoj. La gekursanoj skribe prilaboris unu el la sep ekzamenaj temoj kaj antaŭ la

trimembra ekzamenkomisiono (Zvara — Novobilski — Papazov) buŝe prezentis la akiritajn sciojn. Ĉiu el la sukcese finintoj la ekzamenojn ricevis specialan diplomon.

Al la pozitivaj rezultoj de la Unua KIK certe apartenas:

- la bona nivelo de la prezentitaj prelegoj
- la aktiva kunlaboro de la gekursanoj kaj akirado de novaj kaj utilaj scioj;
- konkreta interŝanĝo de laborsperto kaj efektivaigo de novaj kontaktoj.

Certe dum la laborproceso evidentiĝis ankaŭ kelkaj dezirindaj plibonigoj en la estonta funkciado de KIK:

- pli konvena elekto de partoprenantoj fare de la landaj E-asocioj, por ke ilia nivelo respondu al la celoj de KIK;
- eldono de lernotekstoj por la partoprenantoj;
- certigo de konvenaj kondiĉoj por kontaktoj inter la gekursanoj (interparoloj, diskutoj, improvizitaj programoj k.a.)

Konklude oni povas konstati, ke la unua KIK — 1983 en Varna plenumis siajn antaŭviditajn taskojn kaj montriĝis utila kaj perspektiva aranĝo de la socialismaj E-asocioj.

Al la Bulgara Esperantista Asocio kaj al la stabo de kunlaborantoj, kiuj certigis la sukcesan starton de KIK oni ŝuldas grandan tutkoran dankon!

Doc. d-ro V. NOVOBILSKI, ĈSSR

KUN JUNULA VERVO

La suno jam estis subiranta, kiam ni alvenis en la ĉevalbredan komplekson „Georgi Dimitrov“ en vilaĝo Pobeda, distrikto de Pleven. Ĉi tie la Distrikta Estraro de BEA kune kun la Distrikta Komitato de la Komsomolo en Pleven organizis Internacian Esperantistan Junularan Laborbrigadon — la ununuran ĉi-jare en nia lando.

La brigadanoj atendis nin senpacience, ĉar d-rino Emilia Kanjovska el DE de BEA kaj la vickomandanto de la brigado portis kun si donacojn por la ĉi-vespera gaja festo: du el la brigadaninoj havis naskiĝtagon.

En kortuŝa amika etoso — kun multe da fantazio kaj humuro la brigadanoj prezentis varian amuzan programon, respegalantan ilian ĉiutagan vivon sur la kamparo kaj ilian liberton post la streĉitaj labortagoj. Ĝis noktomezo oni kantis, dancis, amuziĝis!...

La sekvan tagon, frumatene, la brigadanoj viciĝis sur la placeto por saluti la levigon de la nacia kaj esperanta flagoj sur la pilono kaj

por ricevi de la komandanto Vladimir Zahariev la novajn labortaskojn.

Kantante gaje, la brigadanoj direktiĝis per aŭtobuso al la laborkampoj, kie hodiaŭ ili kolektos tomatojn, brasikon, akvumos terenon por cerealoj... Kaj vespere ili denove amuziĝos, kantos, dancos kaj amike babilos en unu komuna lingvo — la lingvo de la internacia amikeco!...

Ili venis ĉi-tien la 1-an de aŭgusto: el Hungario, Pollando, Jugoslavio, GDR, Irako kaj diversaj loĝlokoj de Bulgario — Peŝtera, Kazanlâk, Loveĉ, Tolbuhin, Levski, Pleven k.a. — entute 67 gejunuloj, obseditaj de la deziro labori en internacia esperantista brigado, paroli Esperanton kaj konatiĝi kun la belega lando Bulgario.

La stabo de la brigado konsistis el instruistoj, studentoj, junaj laboristoj. La komandanton V. Zahariev — instruisto de rusa lingvo, helpadis la vickomandantoj Nikolaj Stoev (ankaŭ instruisto de rusa lingvo), la studento

de medicino Ivajlo Hristov kaj la respondeculo pri mastrumaj aferoj Hristo Ignatov. Juna agrarspecialisto — Dimităr Stojanov, ĉiutage, kune kun la anoj de la stabo, difinis la taskojn de ĉiu aparta taĉmento kaj kontrolis la plenumon de la laboro sur la kampoj

— Ekde la komenco mem la brigadanoj montris laborentuziasmon, kvankam multaj el ili por unua fojo estas en terkultura mastrumo kaj por unua fojo tenas en la manoj agrikulturilojn. Ili konscie, kun junula flamo kaj bonkvalite plenumas la labornormojn, — diris al mi la komandanto Zahaŝiev.

— La gvidantaro de la ĉevalbreda komplekso estas tre kontenta pri la laboro kaj konduto de la brigadanoj — diris sian opinion la vicedirektoro Dimo Botev. — Ili jam perlaboris pli ol 2000 levojn kaj ĉiu el ili ricevos po 4,85 levojn tage. Tio estas bona rezulto, konsiderante la fakton, ke ili tute ne havas sperton en agrikultura laboro. Ni estas pretaj akcepti novajn brigadanojn venontjare, se oni decidis denove organizi laborbrigadon.

La junaj esperantistoj montris ne nur kapablon obstine kaj konscie labori, sed ankaŭ amuziĝi en agrabla amika etoso. Ĉiuvespere la apartaj naciaj grupoj prezentis naciajn belartajn programojn kaj poste ĉiuj kune dancis kaj kantis. Multaj el la eksterlandaj brigadanoj komencis lerni ankaŭ bulgaran lingvon kaj jam povis prononci sufiĉe bone kelkajn ordinarajn frazojn. Ni ne parolu pri la sincerej amikaj interrilatoj, la memoron pri kiuj ili gardos dum sia tuta vivo. Neforgeseblaj estas la horoj pasigitaj en komuna laboro kaj amuzado!...

La brigadon vizitis reprezentantoj de Bulgara Esperanto-Junularo kaj ankaŭ la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Donĉo Hitrov, kiu rakontis al la brigadanoj pri la Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto kaj pri la aktivado de TEJO en kadre de la kongreso. D-rino Emilia Kanjovska kaj Pantelej Gospodinov el DE de BEA en Pleven esprimis sian konvinkon, ke la bonaj sperto kaj tradicio de la brigado estos daŭrigataj ankaŭ venontjare. Estos necese, ke la gvidantaro de ĉevalbreda komplekso plibonigu la vivkondiĉojn de la brigadanoj kaj grupigu ilin sur unu laborloko, por ke ili ne sentu sin disigitaj kaj izolitaj unu de la alia. Siaflanke la Distrikta Brigada Stabo ĉe la Distrikta Komso-mola Komitato en Pleven devas turni pli da atento al tiu specifa kaj unika laborbrigado en nia lando, aranĝante por la brigadanoj ekskursojn al historiaj lokoj, renkontiĝojn kun aliaj naciaj junularaj laborbrigadoj en la distrikto, belartajn amuzajn vesperojn ktp. Tio certe kontribuos por plivigligo de la intereso al tiu brigado ankaŭ en aliaj landoj, al kiuj DE de BEA en Pleven devas sendi invitolojn sufiĉe frue.

Ni ne lasu la fajrerojn de la junula flamo estingiĝi. La bulgara nacia trikolora flago kaj la verdstela esperantista flago flirtadu unu apud la alia ankaŭ venontjare dum la tagoj de la Internacia Esperantista Junulara Laborbrigado en vilaĝo Pobeda!

D. SIMEONOV



La partoprenintoj en la internacia E-laborbrigado en v. Pobeda — frumatena saluto al la nacia kaj esperanta flagoj

NIA UNUA GASTO EL MALTO




Foto: Lasto Nikov.

Survoje al la 68-a UK de Esperanto en Budapeŝto, s-ro Carmel Mallia, prezidanto de E-societo „La Espero“ en Malto, restadis dum kvar tagoj en Sofio. Nia kunlaboranto Georgi Mihajlov profitis la okazon kontaktigi kaj interparoli kun li.

— *Kiacele vi estas en Sofio?*

— Dank' al multaj informoj pri la kursoj en IEK en Pisanica kaj ankaŭ laŭ la afabla invito de mia korespondanto Asen Josifov, survoje al la 68-a UK mi decidis pasigi kelkajn tagojn en Sofio.

— *Cu vi uzas Esperanton en via profesio?*

— Mi estas sanitara inspektoro kaj mi ne bezonas uzi Esperanton en mia profesio.

— *Vi flue parolas Esperanton. Kiam kaj kiamaniere vi lernis ĝin?*

— Mi eklernis Esperanton proksimume antaŭ 25 jaroj per korespondaj kursoj de la Brita E-Asocio. Mi daŭrigis la studadon ĝis akiro de diplomo.

— *Cu Esperanto helpis vin en la lernado de aliaj fremdaj lingvoj?*

— Krom la malta kaj Esperanto mi konas ankaŭ la anglan, francan kaj italan, tamen ilin mi lernis antaŭ ol lerni Esperanton. La Internacia Lingvo multe helpis al mi malkovri la internajn malfacilajn kaj erarajn strukturojn de la naciaj lingvoj.

— *Kiom da esperantistoj estas en Malto kaj kiam la Esperanto-movado ekĝermis en via lando?*

— En Malto estas ĉirkaŭ 60 geesperantistoj. La E-movado en nia lando komenciĝis en 1905 kaj en 1906 oni fondis Federacion de la E-societoj en Malto. Sed dum la Unua Mondmi-

lito la agado ĉesis. En 1961 oni fondis tute novan societon.

— *Kiamaniere oni propagandas Esperanton en via lando?*

— Ni organizas du kursojn — korespondan kaj ĉeestan — en privata lernejo. Krome, ni publikigas de tempo al tempo novaĵojn el la monda E-movado. Ili aperas en la maltaj ĵurnaloj jen maltlingve, jen anglalingve. Antaŭ kelkaj monatoj ni disponigis specialajn informojn pri Esperanto al diversaj ministroj kaj intelektuloj.

— *Cu vi estas kontenta pri via restado en Bulgario?*

— Mi trovas, ke la bulgaraj esperantistoj estas la plej amikemaj kaj la plej gastamaj, kiujn mi renkontis ĝis nun. Mi opinias, ke la bulgara karaktero multe similas al la malta. Mi speciale dankas mian leteramikon Asen Josifov, kiu prizorgis ĉion por mia agrabla kaj utila restado en Sofio.

— *Cu vi konas nian revuon „Bulgara Esperantisto“?*

— Oni sendas la revuon al nia societo. Laŭ mi, ĝi donas interesajn novaĵojn pri la bulgara E-movado.

— *Kion entreprenas la maltaj geesperantistoj lige kun la 100-jariĝo de Esperanto?*

— Ni jam havas programon. Ni intencas organizi konkurson por ĝejnuloj pri la E-movado, publikigi la biografion de Zamenhof en malta lingvo kaj la historion de la malta E-movado. Ni planas ankaŭ aliajn interesajn okazantaĵojn.

— *Kion vi bondeziras al la legantoj de „Bulgara Esperantisto“?*

— Se ne estas malmodeste, mi volus dediĉi al ili versaĵon.

SOFIO — BULGARIO

Sonĝosimila en la mensintimo
Obstinas via knara nekutimo.
Fervore, mi, la pasloĝanto hasta,
Huminita de kulturo vasta,
Orientiĝas al vi dum ĉi pilgrimo.

Brilanto centre de l'balkana vervo,
Urno de riĉa heredaj-konservo,
Legendas pasint' via poezia.
Gloras la kortoj monaĥejaĵ mute;
Abismas ŝtonbabiloj persekute.
Respubliko popola, antaŭ via
Intensa bazilik' revolucia,
Ovacias la pac' seniluzia.

24. 7. 1983

CARMEL MALLIA

36-a IFEF-KONGRESO ATENDAS NIN



Jam komenciĝis la preparlaboroj por la 36-a kongreso de Internacia Fervojista Esperantista Federacio (IFEF), kiu okazos en la fama nigramara somerrestadejo „Slănĉev Brjag“ (Suna Bordo), Bulgario, de la 12-a ĝis la 18-a de majo 1984.

Lige kun tiu grava internacia E-arango antaŭ ne-longe nian landon vizitis la prezidanto de IFEF s-ro Joachim Giessner el FRG. Dum sia restado li havis rezultodonajn renkontiĝojn kun la ministro de transporto de PR Bulgario Vasil Canov, kun membroj de LKK kaj kun aliaj personoj, respondecaj pri preparo de la kongreso. Li vizitis „Slănĉev Brjag“ kaj konatigis kun la kondiĉoj, kiujn la fama somerrestadejo proponas al la kongresanoj. Li donis altan pritakson kaj esprimis plenan kontentecon pri la estonta kongrescentro.

S-ro Giessner estis afabla renkontiĝi ankaŭ kun la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Donĉo Hitrov kaj respondi al la starigitaj de li demandoj. Ĉi-sube ni publikigas la interparolon kun s-ro Giessner.

—S-ro Giessner, kiuj estas la ĉefaj argumentoj de IFEF okazigi la 36-an kongreson en Bulgario?

— Principe ĉiujare la vico inviti kongreson estas ĉe alia lando. Aparte grave estas kongresi ankaŭ en socialismaj landoj, por ke pli multe da personoj el tiuj landoj povu partopreni kaj profiti la fakan kaj amikan etoson de la fervojistaj kongresoj. Estis longaj paŭzoj

inter tiuj kongresoj: Hungario — 1962, Bulgario — 1968, Jugoslavio — 1972, Hungario — 1982.

— *Kia estas la kontribuo de la esperantistoj-fervojistoj por sukcesa evoluo de la internacia turismo kaj por interkompreniĝo de la homoj el diversaj landoj?*

Kontribuas foje tiu, foje alia lando, i.a.:
— esperantlingvaj klarigoj por pasaĝeroj en la loĝaroj jam de 8 eŭropaj fervojoj;

— eldono de esperantlingvaj prospektoj pri vojaĝoj per fervojoj;

— tabuloj en stacidomoj por surloke helpi al fremdaj esperantistoj;

— deĵorado de fervojistaj teamoj en universaliaj kongresoj ktp.

— *Cu, via opinie, la IFEF-anoj elmontros intereson per la estonta kongreso?*

— Jes, ili tute certe elmontros intereson, ĉar Bulgario estas alloga lando, kun kiu valoras konatigi, des pli ke por la membroj el la socialismaj landoj estos pli facile aliĝi kaj amase viziti la kongreson.

— *Kiel IFEF kontribuas por la faka progresigo de la fervojistoj?*

— Laŭ sia statuto IFEF celas fakte progresigi siajn membrojn per disvastigo kaj utiligo de la internacia lingvo Esperanto inter fervojistoj, per eldono de speciala organo kaj terminaro. Tiu terminaro helpas por verkado kaj legado de artikoloj kaj revuoj, same por lingva progresigo de la fervojistoj. En la momento ekzistas 7 terminaroj je landa nivelo.

Krome, por faka progresigo servas:

— fakaj prelegoj en IFEF- kaj en Universaliaj kongresoj kaj ankaŭ foje en jarkunveno de landaj IFEF-asocioj;

— fakaj vizitoj en fervojaj entreprenoj;

— raportetoj al IFEF-kongresoj sub titolo „Aktualaĵoj el via lando“;

— praktike ankaŭ per la multnombraj vojaĝoj al kongresoj, respektive inter fervojistaj amikoj.

— *Kiaj estas la ĉefaj celoj kaj ideoj de IFEF, ĝia kontribuo por la monda interkompreniĝo kaj paco?*

— Mi jam menciis la ĉefajn celojn de nia organizaĵo. Sekvante la argumentojn kaj ideojn de d-ro L. L. Zamenhof, la IFEF-anoj, ĝia same kiel la esperantistaro entute, agadas humane kaj neŭtrale. Pro la klara celo de nia agado ni multilate kontribuas por la paco inter unuopaj homoj same kiel inter la popoloj laŭ nia slogano: „La reloĵ ligas la landojn, Esperanto — la popolojn“.

LA PLEJ BONA DONACO

Karaj legantoj,

Ĉi-sube ni proponas al vi novan rakonton de nia estimata veterano Ivan Draganov — multjara fidela leganto kaj kunlaboranto de „Bulgara Esperantisto“ — lige kun lia 85-jariĝo, kiun li festos la 3-an de aprilo 1984.

La aviadilo tre facile surteriĝis sur la flughavenon de Varna. El ĝi eliris juna viro — ingeniero Jean (Jan) Marten. Li ricevis sian pakajon kaj direktiĝis per aŭto al la hotelo, kie li anticipe per la turista oficejo rezervis ĉambron. La ĉambro estis tre komforta, kun banejo kaj aparta akceptejo. Nenio mankis. Li ne atendis tian komforton. Tra la fenestro de la ĉambro sin prezentis belega pejzaĝo de la Nigra Maro. La akvoj de la maro tiun tagon estis trankvilaj, nur facila bruoj de tempo al tempo atingis liajn orelojn — la maro kantis sian eternan kanton.

Jan sin banis, ŝanĝis la kostumon per alia kaj iris al la hotela restoracio. Tie li ricevis sian apetitan manĝeton, kiun li rapide kaj plezure neniigis. Poste eliris de tie kaj sin direktis al la marbordo de tiuj tre famaj „Oraj Sabloj“ ĉe la Nigra Maro. Ili proponis al li ĉarman bildon. Ĉio ĉi tre ravis lin.

La panoramo estis belega, la aero tre pura kaj la ĉirkaŭaĵo — ĉarma. En la turista oficejo en Francio oni informis lin pri tiu ĉi ĉarma naturo, sed li iom sin detenis kredi ĉion. Sed nun li konvinkiĝis, ke la ĉi-tieaj naturo, pejzaĝo kaj komforto estas realaj. La ĉiutageco konfirmis tion. Mankis al li nur kompanio. Sed li ne perdis la esperon, ke li baldaŭ ĝin trovos.

Iun tagon li eniris en la universalan magazinon kaj direktiĝis al la stando, kie oni vendas donacojn kaj diversajn memoraĵojn. Lia rigardo estis tuj kaptita de tiu ĉi stando, kie li rimarkis belegan virinon kun agrabla rideto. Lin rigardis du ĉarmaj okuloj.

Sur unu ŝildo sur la muro estis skribite per oraj literoj:

„Parolataj lingvoj: franca, angla kaj Esperanto“.

Jen estas vera miraklo kaj interesa koincido: la belega vendistino kaj ankaŭ li mem scipovas Esperanton.

Li sin turnis al la vendistino kaj petis ŝin en Esperanto proponi al li la plej interesan donacon kaj memoraĵon el Bulgario. Kvankam ili ambaŭ scipovis francan kaj anglan ling-

vojn, ili preferis paroli en Esperanto, kio kaŭzis al ili plezuron.

— Via peto estas tre interesa, sinjoro, — ŝi respondis. — Kion proponi al vi? Ĉio estas interesa kaj ĉio memorigos al vi pri Bulgario. Aĉetu rozoleon. Vi ne deziras? Bone, tiam aĉetu ŝalmon aŭ sakfluton — bulgarajn naciajn blovinstrumentojn. Ili ĉiam memorigos al vi pri Bulgario. Ankaŭ tio ne plaĉas al vi? Bone! Jen pri kio mi demandas vin, ĉu vi havas amikinojn? Se jes, aĉetu por ŝi bluzon kun bulgara brodaĵo. Tio nepre plaĉos al ŝi kaj memorigos al ŝi kaj al vi pri Bulgario.

— Mi ne havas amikinojn — respondis Jan.

— Tiam la demando estas facile solvebla: morgaŭ antaŭtagmeze vizitu la plaĝon. Tie vi trovos belulinojn kun diverskoloraj okuloj kaj vizaĝoj. Venigu unu el ili kaj tiam ni tuj trovos la donacon. Tiu knabino ĉiam memorigos al vi pri via nuna ekskurso.

Jan kaj la vendistino komencis ridi.

Tiun tagon Jan nenion aĉetis. La sekvan tagon li denove vizitis la universalan magazinon.

De post tiu tago okazis alia miraklo: iliaj okuloj komencis serĉi unu la alian. Li preskaŭ ĉiutage vizitadis tiun ĉi standon. Inter ili komencis kreiĝi bona amikeco.

Sed jen estas unu alia tre interesa koincido: la vendistino estis nomata Vanja (france Jeannette), simile al lia nomo. Ŝi komencis ofte akompani lin dum liaj promenoj.

Iun dimanĉon ili decidis viziti la proksiman faman monaĥejon, nomatan „Alaĝa Manastir“ — antikva kristana kaverna monaĥejo, norde de Evksinograd, situanta ĉe la Nigra Maro mem, kie la bordo estas pli alta, rokoplena kaj samtempe arboriĉa.

La monaĥejo troviĝas alte, en la kavoj de iu roko, kien oni supreniras laŭ ŝtona ŝtuparo. La tempo detruis la eksteran parton de la monaĥejo — restis nur la interno.

Sur la plej alta parto de la monaĥejo kaj de la roko troviĝas malgranda sonorilo. La legendo rakontas, ke la deziro de tiu homo, kiu sonorigos la sonorilon, estos plenumita. Vanja kaj Jan sonorigis la sonorilon, sed neniu el ili diris unu al la alia tion, pro kio ili revis. Tamen, la okuloj de tiuj junaj homoj ekparolis klare, perfidante la sekretojn: ili ambaŭ por unu sama deziro sonorigis...

Iun dimanĉon ili decidis fari malgrandan marekskurson per motorboato. La vetero estis bona, la pejzaĝo belega, la koroj plenaj de amo. Dum la boatveturo subite Jan eksentis

akran doloron en la abdomeno. Ili tuj revenis en la hotelon. Vanja venigis kuraciston. Li konstatis, ke la apendico ne estas en bona stato kaj laŭ lia opinio Jan devas esti transportita tuj en hospitalon, kion ili faris. Tie la kuracistoj konfirmis la diagnozon kaj decidis, ke estas necesa urĝa operacio. Ili faris ĝin, ĉar evidentigis, ke la apendico estas traborita. La operacio estis sukcesa. Jan devis resti en la hospitalo ankoraŭ kelkajn tagojn. Vanja ricevis forpermeson de sia ĉefo kaj la ĉefkuracisto de la hospitalo permesis al ŝi vizitadi ĉiutage la hospitalon por prizorgi kaj flegi sian amikon kune kun la medicina flegistino.

Post lia resaniĝo, dankinte al ĉiuj, kiuj prizorgis lin, Jan donacis al la hospitalo sufiĉe grandan monsumon kun la peto, ke la administracio de la hospitalo aĉetu diversajn ludojn kaj aliajn donacojn, kiuj estu disdonitaj al la malsanaj infanoj en la infana fako de la sama hospitalo por memoro pri li kaj pri Vanja.

Kelkajn tagojn post lia eliro el la hospitalo, iun dimanĉon, promenante preter la marbordo, Jan diris al Vanja:

— Vanja, ĉu vi estiĝus mia amikino en la vivo, mia fidela edzino?

Vanja ekridetis kaj, laŭ la maniero el sia infaneco, diris:

— Jan, fermu viajn okulojn por unu momento, mi petas vin!

Poste ŝi malfermis sian saketon kaj rapide eligis el ĝi belegan broĉon. Ĝi prezentis flugantan mevon, ellaboritan el oro, portantan en sia beko malgrandan verdan steleton kaj en la ungoj — oran ringon. Kroĉinte ĝin sur lia refaldo, ŝi diris:

— Jan, vi jam povas rigardi. Per tiu broĉo-enigmo mi esprimas mian respondon. Ĉu vi povas diveni ĝin? Faru tion kaj vi trovos mian respondon!

Jan jetis rigardon al la broĉo, poste al ŝia vizago; ekridetis kaj, dankante al ŝi pro la broĉo, diris, uzante ŝian esprimmanieron:

— Vanja, ankaŭ vi fermu viajn okulojn por unu momento, mi petas vin!

Tiam li elpoŝigis skatoleton, el kiu li eligis belegan kolieron el smeraldoj. Meze de la koliero, inter la smeraldoj, ridetis malgranda verda steleto. Per tiu koliero Jan persone ornamis ŝian kolon. Poste li diris:

— Vanja, vi jam povas rigardi. Mi divenis vian enigmon kaj jen estas mia respondo. Ekde nun vi estas mia fianĉino. Pretigu vin rapide, ĉar ni baldaŭ forveturos al Francio, kie ni ge-
zediĝos. Ĉu vi konsentas?

— Jes, karulo mia, — respondis Vanja kaj ĝoje ridetis.

Antaŭ ol forveturi al Francio, ili vizitis kelkajn agrikulturajn laborkooperativojn kaj industriajn entreprenojn. Inĝeniero Jean Mar-

ten estis forte impresita de la granda progreso de socialisma Bulgario.

Tiel Jean Marten trovis kaj ricevis la plej belan donacon kaj memorajon el Bulgario — la koron de Vanja.

Nun ili estas feliĉaj. Aperis infanoj — Rosalie kaj Julien.

Versajne vi deziras scii, kio proksimigis ilin tiel forte, kaj kiu estas la plej grava kaŭzo pri tio?

Ni respondos — la ĉarmaj nigraj okuloj, la agrabla rideto kaj la kompatema koro de Vanja.

Kaj ankoraŭ io — Esperanto, kiu ludis gravan rolon en tiu ĉi historio.

Jean Marten ne nur gajnis bonan amikino el Bulgario, sed li mem estiĝis bona amiko de Bulgario kaj ĝia konstanta propagandanto.

Eble vi interesiĝas, kiel fartas nun Vanja? Ŝi ankaŭ trovis sian feliĉon. Vi ofte povus vidi ŝin, ĉirkaŭite de Rosalie kaj Julien, rakonti al ili pri Bulgario, kie oni kreas novan, helan vivon, pri la Nigra Maro, pri la „Oraj Sabloj“ kaj pri la belaj gajaj mevoj. Sed iufoje ŝi subite ĉesas rakonti, ĉar la malgranda Julien interrompas ŝin, petante:

— Panjo, mi petas vin, rakontu al ni ree pri la „Ora Mevo“, kiu portas feliĉon!

Vanja ĝoje ekridetas, kisas siajn infanojn kaj denove komencas rakonti la mirindan fabelon pri la „Ora Mevo“.

IVAN DRAGANOV

TART EKFUNKCIIIS

En marto ĉi-jare al la Sekcio de Filologoj ĉe BEA ekfunkciis Tutlanda Amika Rondo de Tradukemuloj (TART). Ĝin fondis grupo da entuziasmuloj, eksaj kursanoj de Violin Oljanov. TART jam havas sian regularon kaj estraron. Ĝia gvidanto-redaktoro estas Violin Oljanov, sekretario — Ĉudomir Kantargiev kaj kasisto — Veneta Baleva. En TART povas membri ĉiu ŝatanto de tradukado, diplomita pri posedo de Esperanto (III grado) kun noto almenaŭ „tre bona“. La celo de TART estas preparo de spertaj tradukistoj, kiuj laŭbezone faros altkvalitajn tradukojn de verkoj el la bulgara literaturo en Esperanton.

La fondintoj de TART estis nur ok personoj, kiuj loĝas en kvin diversaj regionoj de Bulgario. Nun jam dudek personoj membriĝis en la Rondo. La kontakto inter la rondanoj estas perletera. Ĉiumonate ili ricevas per la poŝto tekston, kiun ili tradukas en Esperanton kaj resendas ĝin al la gvidanto-redaktoro por redaktado kaj pritakso.

Ĉiuj interesiĝantoj povas aliĝi, sendante skribpeton al la sekretario de TART Ĉudomir Kantargiev, 8800 Sliven, Lev Tolstoj 4, indikante siajn nomon, adreson, profesion kaj la gradon de posedo de aliaj fremdaj lingvoj.

V. B.

Eksterlandanoj gaste en IEK — Pisanica

JAROSLAV POLENSKY — ĈSSR

Jam trian fojon mi vizitas vian landon. Unue mi partoprenis la UK en Varna (1978), poste mi gvidis kurson en IEK — Varna. Ĉi-jare mi instruas Esperanton al la kursanoj de dua grado en Pisanica. Al mi tre plaĉas instrui Esperanton en Bulgario kaj se oni invitus min, mi plezure venos ĉi-tien ankaŭ la sekvan jaron.

Pisanica disponas pri ĉio necesa por lernado. Laŭ mi la studado ĉiam devas doni ne nur lingvosciojn, sed ankaŭ plezuron kaj ĝojon al la kursanoj, tial mi strebis variigi miajn lecionojn.

BERNARD VIVIEIZ — FRANCIO

En Bulgario mi estas por unua fojo. Min forte impresis via lando kaj speciale la homoj — ĝentilaj kaj ĝojaj. Estis plezuro por mi ĉeesti la kurson por instruistoj en IEK. En la kurso de s-ro Vălev mi aŭskultis interesajn prelegojn pri historio kaj literaturo de la E-movado. Mi eĉ faris provlecionon kaj mi estis feliĉa ricevi diplomon pri instruarĵto.

PIERRE HURÉ — FRANCIO

En IEK-Pisanica mi estas por la dua fojo. Antaŭ kelkaj jaroj mi partoprenis la solenan inaŭguron de la kursejo fare de d-ro Tonkin. Ĉi-jare mi profitis la okazon post la UK en Budapeŝto viziti bulgarajn amikojn en Pleven kaj veni tien ĉi.

Laŭ mi IEK havas eblecojn esti ĝi bonega loko por lernado kaj feriado samtempe, ĉar ĝi situas meze de ĉarmaj ĉirkaŭaĵoj. Posttagmeze oni povas ekskursi kaj vespere danci en la diskoteko.

ÉVA NYILAS — HUNGARIO

Generale al mi plaĉas esti en Bulgario. Jam kelkfoje mi vizitas vian landon. Nun mi partoprenas instruarĵtan kurson. La lektoro — s-ro Vălev, prelegas bonege kaj li mem estas interesa persono. Mi jam faris provlecionojn kaj atendas la ekzamenojn. En la Kursejo al ni estas disponigitaj ĉiuj eblecoj lerni, perfektigi niajn konojn pri la lingvo, metodiko de instruado, E-literaturo kaj historio kaj ankaŭ bone ripozigi.

HISAKO MATUDA — JAPANIO

Pri ĈSSR, Pollando, Hungario mi ja havis iujn informojn, sed pri Bulgario — tute ne. Vidinte la foton de IEK, mi decidis: ĉi-foje mi iros tien.

Dank' al ĉi tiu kurso mi eksciis multon. Neniam mi supozis, ke en iu tiom malgranda lando la E-movado povas tiel kreski kaj flori. S-ro Vălev prelegas tre interese. Al mi multe plaĉis la provlecionoj de miaj samklasanoj.

TAKASI OOHARA — JAPANIO

Mia edzino Utako kaj mi estas unufoje en Bulgario. Via lando estas riĉa je montoj, la aero estas freŝa, la homoj — sinceraj, kaj Esperanto — populara. La Internacia E-Kursejo estas vaste konata en Japanio. Bedaŭrinde, mi malfrue aliĝis al tria grado, sed mi estas tre kontenta de la instrumentado de s-ro Violin Oljanov, gvidanto de nia klaso. Dum la liberaj tagoj ni multe ekskursis kaj tio tre plaĉis al mi. Mi kredas, ke se mi havos ebleco, mi denove venos en Bulgaron.

OLEG POPKOV — SOVETUNIO

Duafoje mi estas en Bulgario kaj mi jam sukcesis ekami tiun ĉi landon kaj konatigi kun multaj bulgaraj geesperantistoj. Mi opinias, ke en Bulgario Esperanto estas en bonega stato. Tiu ĉi kursejo estas por mi mirinda fakto, ekskluziva fenomeno.

Mi volas serioze okupiĝi pri E-kulturo, historio kaj teatro, pro tio mia restado en IEK estis granda paŝo antaŭen. Preskaŭ monaton mi jam estas inter esperantistoj el diversaj landoj kaj tio helpas al mi perfektigi mian lingvoscion.

ROY MCCOY — USONO

Mi esperantistigis pasintjare, kaj, laŭ la rekomendoj vojaĝi kaj ĉeesti kongresojn, kursojn kaj aliajn E-arangojn, ĉi-jare mi partoprenis kongreson de ELNA (Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko), kie mi servis kiel protokolisto. Poste mi forflugis al Budapeŝto, kie mi konatigis kun bulgara junulino. Laŭ ŝia invito mi gastis en urbo Ruse kaj poste mi venis ĉi-tien. Estis honoro por mi esti invitita ĉeesti la instruarĵtan kurson, gvidatan de s-ro Vălev. Mi estas tre kontenta pri la instrumaniero, sed mi kredas, ke devas esti pli da deviga legado ekster la klasĉambroj. Parolante la nacian lingvon, oni perdas la oportunon lerni Esperanton.

En Bulgario oni akceptas Esperanton kiel lingvo taŭga por ĝenerala instruado, kio estas granda atingo.

Pisanica — Sofio,
aŭgusto 1983

Intervjuis: VENETA BALEVA

PISANICA EN LA KOR'

Kio ĝi estas? Realajo aŭ fabelo? Bela sonĝo? Forpasas tagoj, semajno, monato... Sed ne forvelkos en la memoro la blanka kursejo kun la verda stelo sur la tegmento. Jen estas nia klasĉambro, la diskoteko, la korto kun la skulptaĵo de Zamenhof. Kaj kiom da geamikoj — la plej granda valorajo en la homa vivo! Liberiginte de laboro kaj hejmaj zorgoj, mi ŝatus denove „travivi Bulgarion“ — tagon post tago, horon post horo! La amika vespermanĝo en sofia hotelo „Balkan“ donis al ni la gojon de konatiĝo, amason da informoj. Sed antaŭe estis Pisanica! Tutan jaron mi revis pri ĝi, tralegis ĉion, kion mi povis trovi en E-periodaĵoj. Alveturinte en Smoljan, neniu volis resti tie ĝis la sekva mateno. Ni volis vidi la Esperanto-kursejon!

La unuaj konatiĝoj, la unuaj interparoloj, vizito de provlecionoj, prelegoj de brila lektoro Kunĉo Vălev... Kiom da neforgeseblaj momentoj! Kaj la vesperoj? Neniam mi forgesos ilin: „Interkona vespero“, „Lignofajra vespero“, vespero de la bulgara-sovetia amikeco, „Adiaŭa balo“ kun ĉarma kantado de Veselin Damjanov, majstra aktorado de Belka Beleva kaj Anani Anev, ridiga konkurso de beleco. Kaj fine nin atendis ankaŭ ekzameno, kiun ni timis kaj pri kiu ni duonvoĉe plendis.

Kial oni sentas sin tiel bone en Pisanica? Eble ĉar gekursanojn kaj instruistojn kunligas unu komuna amo — Esperanto, unu komuna deziro — labori por ĝi. Mirinda ĝi estas — la lingvo Esperanto. Homoj, alvenintaj el diversaj landoj, kreskintaj en diversaj sociordoj, povas libere interparoli kaj bonege kompreni unu la alian.

Ĝis revido, Pisanica! Ĝis revido, mirinda loko en Rodopi-montaro!

OLGA BUŜ,
Rig1, USSR

MIA KARA BULGARIO

Dek tagojn mi estis en Bulgario, sed ili restos por ĉiam neforgeseblaj en mia memoro. Unuafoje mi havis honoron esti invitita de BEA partopreni kvalifikan kurson por esperantistoj en Varna. Ni aŭskultis prelegojn pri la lingvo Esperanto kaj pri la tutmonda E-movado.

Nia grupo estis internacia: ni alvenis el diversaj urboj de la socialismaj landoj. Sed ni havis komunan lingvon Esperanto, kiu amikigis nin. Dum la libera tempo ni ekskursis al diversaj vidindaĵoj en Varna kaj ĝia regiono.

La fama urbeto Balĉik per siaj palaco kaj botanika ĝardeno forte impresis nin. Emocia estis ankaŭ la spektaklo de l'opero „Aida“ en la urba somera teatro.

Revenante al Sofio, mi gastis unu tagon ĉe amikoj-esperantistoj en Gabrovo. Malmulta estis la tempo, sed mi sukcesis viziti la belegan arkitekturan ensemblon „Etăr kaj „Bojenci“. Nia aŭto preterveturis Veliko Târnovo, sed eĉ de malproksime tiu unika urbo pensigis min pri iu fabela, antikva lando.

La lastajn tagojn mi estis en Sofio. De frumateno ĝis vespero mi promenadis laŭ ĝiaj stratoj, trarigardante la multnombrajn monumentojn. Mi vizitis ankaŭ la Nacian Artgalerion kaj ĝuis la bildojn de modernaj bulgaraj kaj fremdlandaj pentristoj. La vizito al Rila-monaĥejo estis por mi granda travivaĵo. Vere mi estis mirigita de la dimensioj de tiu historia monumento.

Mi estis feliĉa viziti Bulgarion kaj mi ne povas trovi vortojn, esprimantajn mian amon al ĝi; kaj pli grave — mian amiksenton al la bulgaraj esperantistoj. Kun ili mi ĉiam trovis komunajn interesojn. Mi eksentis en la sinteno de miaj geamikoj-esperantistoj la spiriton de l'bulgara popolo: gastama, sincera, pacama, laborema.

Fine mi deziras danki al la estraranoj de BEA, kiuj faris mian restadon en Bulgario tre agrabla. Mi faros ĉion eblan por la prospero de nia amikeco, por nia komuna lingvo Esperanto. Mi volus diri al la tuthomaro: „Homoj, mi estas feliĉa paroli Esperanton. Lernu ĝin, ĝi feliĉigos ankaŭ vin!“

Ĝis baldaŭa revido, kara Bulgario!

VU THANH HUONG



Nikola Poparov — prezidanto de DE de BEA en Gabrovo, bonvenigas la vjetnaman esperantistinon Vu Thanh Huong kaj donacas al ŝi memoraĵojn.

PRINCIPOJ POR ORTOGRAFIJAJ NORMOJ EN ESPERANTO

Mi deziras en tiu ĉi artikolo prezenti por konsidero kelkajn principojn por ortografiaj normoj en Esperanto, kiujn ne ĉiuj redaktoroj konas aŭ akceptas. Rezulte de tio, aŭtoroj ofte trovas, ke vortoj kaj propraj nomoj en la originala manuskripta versio, okaze de publikigo, estis ŝanĝitaj por konformigi la ortografion al la normoj de la publikigaĵo. Estas necese klarigi la aferon detale, ĉar ĉiam ekzistas eblo, ke kelkaj legantoj opinios, ke la vortformoj montrantaj arkaikigon, nekutiman literadon aŭ deflankigon de evolutendencoj en Esperanto, venis de la plumo de la aŭtoro, dum male, ili estis truditaj fare de la redaktoro, foje kun antaŭa averto kaj diskuto, foje sen iu ajn interkonsento. Ekzistas tri eblaj agmanieroj, kiujn redakcio povas sekvi ĉirilate.

1. Oni permesas al ĉiu aŭtoro uzi la lingvon laŭ sia bontrovo, kaj la respondeco restas ĉiam ĉe la verkinto. Eble la sola limigo estu kontraŭ lingvouzo, kiu estas kontraŭfundamenta aŭ gramatike erara. Tiu ĉi sinteno donas la plej ampleksan liberon por la formado kaj transskribo de lok- kaj personnomoj.

2. Ĉe la antipoda poluso, oni devigas konformigon ĉiurilate kaj senescepte al principoj starigitaj de la redakcio, por ke estu atingita en la publikigaĵo absoluta unuformeco inter la verkoj de diversaj aŭtoroj.

3. Enkadre de klare formulitaj redakciaj reguloj aŭ principoj, oni permesas al aŭtoroj liberon rilate la lingvouzon kondiĉe, ke ili povas motivi siajn elektojn per aliaj egale aŭ eĉ pli pravaj principoj. Mi mem defendas tiun ĉi starpunkton, kaj laŭ mia sperto, la redakcioj de la plejmulto da Esperanto-publikigaĵoj pli-malpli akordas. La granda merito de tiu ĉi fleksebla sinteno estas, ke ĝi evitas sufokon aŭ paralizon de vivanta, daŭre evoluanta lingvo. Se okazas akra konflikto inter la redakciaj normoj kaj la persona uzo de iu aŭtoro, estas ĉiam eble prezenti klarigojn kaj pravigojn ambaŭflanke en la formo de piednotoj, en glosaro kun ampleksaj komentoj, aŭ en apendico aldonita al la koncerna verko. En miaj fakaj artikoloj mi aplikis tiujn rimedojn kaj mi ne ricevis objetojn aŭ de redaktoroj aŭ de legantoj.

En la daŭro de mia okupiĝo pri la faka aplikado de Esperanto, mi provis trovi principojn por gvidi min en la labirinto de terminologiaj problemoj. Mi devis fari tion, ĉar (1) ankoraŭ ne ekzistas sufiĉe da fakliteraturo en Esperan-

to, kiu povas provizi verkeman fakulon per fidindaj modeloj de lingvouzo, (2) vere internaciaj kaj kompletaj terminologioj ne ekzistas, kaj (3) mankas poliglotaj vortaroj por kelkaj sciencoj, kiuj povas funkcii kiel bazo por la kompilado kaj formado de esperantlingva fakterminaro. Mi devas, do, elturnigi alimaniere kaj ankaŭ izolate. Ĉi-sube estas la principoj, kiujn mi formulis kaj uzis ĝis nun. Ili estas nek universale aplikeblaj, nek devigaj por ĉiu kazo, ĉar ofte estas necese allasi esceptojn, laŭ eble, konforme al alia principo. La celo estas krei plejeble harmonian sistemon sen seriozaj kontraŭdiroj. La vicordo de la principoj ne indikas ilian relativan gravecon, ĉar malfacile estas objekte mezuri tion.

1. Zamenhofa uzado
2. Longdaŭra uzado fare de aliaj esperantistoj, laŭ la fakuloj
3. Registrado en vortaroj, glosaroj, fakterminaroj ktp.
4. Apogo de elstaraj esperantologoj
5. Oficialigo fare de la Akademio de Esperanto
6. Maksimuma internacieco de vortformoj kaj signifoj
7. Analogio kun aliaj vortoj en Esperanto havantaj similan etimologion aŭ parencon signifon, por eviti malsimetriojn
8. Evito de homonimoj, paronimoj kaj ankaŭ kalkeoj (=paŝaĵoj)
9. Elektro de literado havanta facile prononceblajn sonojn kaj songrupojn
10. Elektro de radikoj, kies formo ebligas facilan kaj senliman pluformadon
11. Prefero al formado de terminoj surbaze de morfemoj jam ekzistantaj en la lingvo por eviti nenecesajn neologismojn
12. Prefero al polisemio kondiĉe, ke ne povas okazi miskompreno aŭ ambigueco
13. Kombino de grafismo kaj fonetismo, por ke vortoj estu rekonobeblaj skribe kaj parole
14. Evito de inventitaj kaj arbitre formitaj esperantonimoj
15. Limigita asimilado de nur la plej ofte kaj bone konataj nomoj de lokoj kaj personoj.

Kompreneble, oni povas aldoni pli da principoj al tiu ĉi listo. Cetere, estas necese substreki, ke tiuj principoj devas esti plej rigore aplikataj en la formado de sciencaj kaj teknikaj terminoj, kiuj ne ĉiam estas ĝuste traktitaj en Esperanto-publikigaĵoj.

BERNARD GOLDEN

Enlanda movado

FESTO DE STRATO „ESPERANTO“

Ekde 1978 la loĝantoj de strato „Esperanto“ sub la protekto de la urbestro, de la Patrolanda Fronto kaj de la loka E-societo „Solidareco“, ĉiujare aranĝas — kutime fine de julio, originalan „Feston de la strato“. Ĉiu familio, loĝanta sur la strato, preparas diversajn tipe bulgarajn kukojn, sukeraĵojn, trinkaĵojn kaj metas ilin sur la komunan manĝotablon. Ĉi-jare la festo okazis la 12-an de aŭgusto.

Malgraŭ la pluvego, strato „Esperanto“ festis por sesa fojo. Venis la speciale invitataj esperantistoj el Bankja kaj Sofio. Kune kun la sofiaj esperantistoj venis ankaŭ la germana samideanino Ludmila Hypius.

La festo komenciĝis per akompanita de marŝmuziko prezentado de la plejaĝuloj de ĉi tiu mirinda, vere verda strato, kun multaj arboj kaj floroj en kortoj kaj ĝardenoj.

Pri la stratfestoj, pri ĝia historio kaj efiko sur ties loĝantojn parolis la maljuna popola instruisto Boris Popov. En sia parolado interalie li menciis la interesan fakton, ke sur la strato kreskas 39 tilioj kaj la nombro de la strataj infanoj estas same 39! Interesa koincido, ĉu ne? Pasintjare, laŭ lia iniciato la infanoj de strato „Esperanto“ organizis malgrandan infanasembleon „Standardo de la paco“ sub la devizo: „Paco kaj amikeco“. Post la raporto la infanoj je aĝo de 3 ĝis 15 jaroj plenumis infanajn kantojn, rondodancojn kaj alvokojn por paco.

La urbestro de Bankja ing. Dojno Petrovski salutis la festantojn. Interalie li diris, ke jam kreiĝis nova tradicio, laŭenhave socialisma, laŭ formo — profunde popola.

En la nomo de E-societo „Solidareco“ en Bankja d-ro Milev ankaŭ salutis la festantojn. „Ĉiuj loĝantoj de strato „Esperanto“ — li diris — devas lerni la Internacian Lingvon, ĉar la urbeto jam estas internacia ripozloko kaj multaj eksterlandanoj vizitas ĝin.

La gastino el GDR Ludmila Hypius esprimis admiron pri tiu originala festo, nekonata en aliaj landoj.

Malgraŭ la malfavora vetero, la ĉi-jara festo de strato „Esperanto“ pasis bonege, multe kontribuante por la proksimiĝo kaj intimiĝo de la loĝantaro.

GENKA BANĈEVA
D-ro T. MILEV

GABROVO

La 5-an de septembro ĉi-jare DE de BEA — Gabrovo, okazigis specialan distriktan konferencon pri la problemoj de la nova E-lernoĵaro. Ĉeestis reprezentantoj de ĉiuj E-societoj en la distrikto. Gasto de la konferenco estis Marin Băcev, membro de CE de BEA.

Belĉo Varsev, respondeculo pri la instrua laboro en Gabrovo, raportis pri la rezultoj de la pasinta 1982/83 lernoĵaro kaj pri la ĉi-jaraj preparoj.

La partoprenantoj akceptis la proponojn pri la komenciĝanta E-lernoĵaro. Fine Neno Janev parolis pri la artikolo de M. Băcev: „La E-instruado — nepre reorganizenda“ (BE, n-ro 7/83). Oni aktive pridiskutis la artikolon. Kamarado Băcev respondis al ĉiuj demandoj.

SONJA TIHOVA

NOVI PAZAR

Unuan fojon ĉi-jare la ĝelernantoj el klubo „Juna Esperantisto“ kun gvidantino Neli Dimitrova, partoprenis la festan manifestacion je la 9-a de septembro — la Tago de Libereco.

Portante sloganon „Esperanto“, verdajn stelojn kaj blankajn kolombojn, la junaj geesperantistoj esprimis sian deziron pri paco kaj amikeco en la tuta mondo.

N. GEORGIEVA

SUMEN

Antaŭ nelonge geesperantistoj el urbo Ŝumen havis la plezuron ĝui la arton de la junaj ĝelernantoj el Dua Elementa Lernejo „Nikola Vapcarov“ en urbo Novi Pazar. Sub la gvidado de E-instruistino Neli Dimitrova estis prezentitaj „Fabelo pri la tilieto kaj la avida virino“ kaj fragmento el la Sekspira dramo „Romeo kaj Julieta“. Bone ludis Angelinka Hristova, Pepa Georgieva, Antonia Atanasova, Svetlomira Dimčeva, Dimitrička kaj Plamen Bojčev. Post la spektaklo la prezidanto de DE de BEA en Sumen gratulis la junajn aktorojn kaj bondeziris al ili novajn sukcesojn.

N. D.

DRJANOVO

Multe da esperantistoj el Drjanovo, Sumen, Stara Zagora, Pavlikeni kaj aliaj loĝlokoj partoprenis la tradician foirfeston, okazintan la 18-an de septembro 1983 en la pitoreska Monaĥejo de Drjanovo.

VLADIMIR LAZAROV

ATENTU — KASEDOJ!

La magnetofona servo ĉe BEA povas liveri al vi kasedon, entenantan kantojn en Esperanto. Ili estas konvenaj por kantado en E-kursoj, por kunvenoj, amuzaj aranĝoj ktp; ili taŭgas ankaŭ por hejma aŭskultado. Kantas elstaraj gekantistoj.

Se vi sendos du novajn kasedojn aŭ monon (kiu egalvaloras ilian prezon) al Petko Arnaudov, 4400 Pazargik, str. Nikifor Popkondantinov 40, unu el ili vi ricevos jam entenanta la kantojn. Alilandanoj iel devas rekompenci ankaŭ la sendokostojn de la magnetofona servo.

PRINTEMPA E-RENKONTIGO

En Soĉi okazis la 6-a E-Renkonto ĝis Prin-tempa, en kiu partoprenis 40 esperantistoj el ses urboj de la regiono kaj Abĥazio (tie aperis nova E-grupo).

Kiel kutime, ni havis renkontojn en la loka E-klubejo kaj ĉe la fama Arbo de Amikeco (speciala arbo kun greŝtoj de esperantistoj el la tuta mondo).

Ni ekskursis per aŭtobuso, ornamita per E-ŝildoj, kaj vizitis la najbaran belan Abĥazion, lagon Rica kaj Picunda. Oni rakontis al ni pri sia bela respubliko, pri la nova E-klubo en Suĥumi.

ANATOLIJ IVASENKO

20-A JUBILEA ĈEBALTA E-TENDARO

De la 1-a ĝis la 10-a de julio en urbo Kaunas (Litovio) okazis la 20-a Jubilea Ĉebalta Esperanto-Tendaro. Ĝin partoprenis pli ol 300 personoj.

La programo estis tre riĉa. La tendaranoj havis eblecon sunbruniĝi, naĝi en rivero, ripozi en arbaro kaj vespere ĉe lignofajro spekti Esperantajn koncertojn kaj teatraĵojn. Oni partoprenis kunvenojn de klubestraranoj, instruistoj, tradukistoj. La prelegoj estis dividitaj je tri sekcioj: lingvistika, literatura, popular-sciencia.

En Kaunas ni vizitis artgalerion, muzeojn de skulptaĵoj kaj vitraĵoj, pentramuzeon kaj muzeon de la muziko de Ĉiurlionis.

SVETLANA POGORELAJA

OKSEJT'25

Ni, junaj esperantistoj el Ĉeljabinska E-Klubo „Stelo de l'espero“ ĉi-somere partoprenis en OKSEJT'25 (Okcidenta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro) en turista stacio „Dubki“ apud Kujbiŝev.

Unufoje dum OKSEJT funkciis Lernejana Esperantista Taĉmento (LET). Pli ol 20 ge-
knaboj ripozis kaj laboris kune. Nia LET havis propran komitaton, murgazeton.

Krom tendaraj aranĝoj: Neptunfesto, Tago de la naskiĝintoj, sabatlaboro, mitiĝo en la Pactago ktp., ni preparis ankaŭ proprajn aranĝojn. Ni ekskursis per dizela motorŝipo laŭ Volgo al urbo Toljatti kaj ekkonis la laboron de la tiea E-klubo „Flamo“, gvidata de A. P. Kalaŝnikov. Ĉiuj LET-anoj tre bone trapasis la ekzamenojn.

TATJANA BAŜMAKOVA

FORPASIŜ SINDONAJ ESPERANTISTOJ

Prof. VASIL ĈOĈOV

La konsterna sciigo pri la antaŭtempa morto de prof. Vasil Ĉoĉov trafis min en Pisanica dum la internaciaj Esperanto-kursoj. Mi ne povis efektiviĝi la lastan adiaŭon kun la sammovadino kaj amiko de pli ol 40 jaroj.

Mi konatiĝis kun li dum la kongreso en Loveĉ en 1940, kiu okupas apartan lokon inter la antaŭmilitaj kongresoj en Bulgario per sia etoso de entuziasmo kaj junula batalemo. Nia konatiĝo havis la saman karakteron. Li venis el Sofio per biciklo, kio estis kroma indiko pri la flamo, fajranta en niaj koroj.

Sekvis kunagado dum la studentaj jaroj. Li aktivis en la E-movado seninterrompe. Interalie li (kune kun Nano Nanov) tradikis kaj prizorgis la eldonon de la broŝuro de Ernst Drezin pri Esperanto kaj la E-movado. En la sama tempo sufiĉe da vervo restis en lia koro por la kruela kontraŭfasisma batalo, en la studenta organizo kaj manifestiĝoj.

Post la liberigo elsub la faŝismo Vasil Ĉoĉov ekiris la krutan vojon de sciencisto: asistanto, docento, profesoro de sociologio. Malgraŭ sia scienca okupiteco li ne ĉesis fordoni tempon kaj fortojn al la E-movado. Ĝis la lasta spiro li kontribuis al „Bulgara Esperantisto“, kies redakciano li estis. Prof. Ĉoĉov neniam rifuzis fari prelegon, partopreni la organizadon de naciaj, internaciaj kaj regionaj aranĝoj. Li ĉiam esprimis sian gojon, ke troviĝas inter esperantistoj. Nun lia loko aflikte vakas.

Sed restos la memoro pri la sindona, afabla, ŝercema kaj bonkora amiko kaj kamarado.

VIOLIN OLJANOV

NIKOLA STEFANOV

Forpasis la veterano de la bulgara E-movado Nikola Stefanov Vangelov. En sia junago li laboris en la sukerfabriko en Plovdiv, kie laboris ankaŭ liaj patro kaj frato. La familio loĝis en la ĉefabrikaj dometoj. La salajroj, la laborkondiĉoj kaj la loĝdometoj estis tre mizeraj. Sed la junulo ne malesperigis. Li kuraĝe ekstaris sur la vojo de la klasa laborista batalo. Li agis kiel organizita membro de la nelegala Junkomunista Unuiĝo, poste eniris la vicojn de la Komunista Partio. En 1931, kiel soldato, li suferis areston kaj torturadon. Denove li estis arestita en la sekvanta 1935 jaro kaj jetita en malliberejon.

Esperanton li verve eklernis kiel junulo, malgraŭ ke jam tiam li sciopovis la italan, kiun li lernis en itala laborista familio en Plovdiv. Memstare li estis ellerninta en sufiĉa grado ankaŭ la francan.

Multe aktivis Nikola Stefanov sur la kampo de laborista esperantista movado. Li estis unu el la fonditoj de LEA-sekcio en Plovdiv, kaj baldaŭ iariĝis ĝia sekretario, ĝia animo. Dum la periodo 1931—1934 li estis sekretario de la Distrikta Komitato de LEA en Plovdiv. Li neniam ŝparis tortojn kaj energion por la prospero de la movado. Plenforte li partoprenis la reduktadon kaj eldonadon de la nelegala esperanta gazeto „Sturmaj“ (1934—1935).

Nikola Stefanov aktivadis ankaŭ en la Bulgara Esperantista Asocio. Dum kelkaj jaroj li estis membro de la Centra Kontrola Komisiono de BEA.

Sian tutan vivon Nikola Stefanov dediĉis al la prospero de la bulgara popolo. Liajn meritojn danke memoros esperantistoj kaj amikoj de Esperanto.

KOSTA ĈIĈANOV



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Lidia Juseinova (20-jara infana instruistino) — str. „Kiril kaj Metodij“ 41, BG-5500 — Loveč — kun ĉl. Griša Presedaški (20-jara fraŭlo) — gradska bolnica, vatreŝno otделение, BG-5500 Loveč — kun ĉl. Stefka Borisova (17-jara lernantino) — str. „Klissura“ 18, Karnobat — kun ĉl pri kalendarretoj, sportaj flagetoj, gramofondiskoj, sportfotoj.

D. Iliev (49-jara fraŭlo) — B 8, et. 2, BG-2112 Gabra — kun bulgarinoj pri popolmuziko, filmoj, teatro.

Diana Georgieva (17-jara lernantino) — str. „M. Gorki“ 7 A — 2, BG-3000 Vraca — kun ĉl pri popolmuziko.

Sašo Cvetanov (30-jara oficisto) — poste restante, BG-5250 Svisŝto — kun ĉl pri moderna muziko, kolektas bk, pk.

Maria Mančeva — str. „V. Levski“ 11, BG-6155 Pavel Banja — kun ĉl kaj interŝanĝi bk, memoraĵojn kaj E-literaturaĵojn.

HUNGARIO

Barbara Hajas (12-jara knabino) — H-9700 Szombathely, Baratsag u. 15. I. 6 — kun 11—13-jaraj geknaboj.

Dobrovics Noemi (junulino) — Repcelak 9653, Jozsef Attila u. 4 — kun 16—17-jaraj bulgaraj geesperantistoj.

Kovacs Erika (16-jara lernantino) — H-1131 Budapest, str. Thaelmann 22/c — kun bulgaraj gejunuloj pri sporto, muziko, literaturo, kolektas bk.

Kaszas Judit (20-jara studentino) — H-3100 Salgotarjan, Rakoczi ut. 2 — pri belliteraturo, sporto, naturo, filmoj, teatro.

Bokkon Csaba (20-jara junulo) — H-8400 Ajka, Verseny u. 2 — kun gebulgaroj pri ĉiuj temoj.

11-jaraj geknaboj el kvara klaso deziras korespondi kun samaĝa grupo el eksterlando — Adreso: Toth Gabriella, Erkel Ferenc u. 52, H-8500 Papa.

Barta Zoltan (17-jara junulo) — B. A. Z. Megye, H-3659, Sata, Koloszsvari ut 10/1 — kun bulgaraj esperantistoj pri lingvoj (angla, hispana, Esperanto).

DANKESPRIMO

Mi dankas al ĉiuj gekamaradoj kaj amikoj, enlandaj kaj eksterlandaj, kiuj salutis min lige kun mia honorigo per la alta ŝtata distingo „Heroo de Socialisma Laboro“.

ĤRISTO GOROV

NIAJ PERANTOJ

Britio. S-ro Paul Hewitt, Highfield Road, North Thoresby, Grimsby, South Humberside DN 36 5 RT.
Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, CS 110 00 Praha 1. Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.
S-ro Daniel Papak, Šmermova 35/1, CS — 04001, Košice
Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Danlando. S-ro J. H. Eriksen, Torhølsvej 26, DK-9800 Hjørring Poŝtkonto: 771.77 R
Jarabono: 38 kr.

Federacia Respubliko Germanio. S-ro Roland H. Heegen, Schlossgasse 30, D-6738 Elmstein.
Jarabono: 8 DM

Finnlando. Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101
Kuopio 10.
Jarabono: 24 fmk.

Francio. S-ro Roger Degrelle, B. P. 23, Nancy. F-54510 Tomblaine,
Girkonto: 771.77 R
Jarabono: 20 ff.

Germana Demokratia Respubliko. Esperanto-Asocio de GDR, Charlottenstr. 60, 108 Berlin.

Hispanio. S-ro Adonis Gonzalez Meana, C. Marc. González 5—4° dcha., Gijón (Oviedo).
Jarabono: 300 pesetoj.

Hungario. „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H—1443 Budapest.
Jarabono: 60 forintoj

Japanio. S-ro Yoshiaki Mizuno, 327, Kitairiso, Sayama-shi, Saitama-ken 350—13.

S-ro Nanba Syōzi, Hiruiti 3-13-26, Zyoto-ku, Osaka 536.
Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Kubo. S-ro Pedro P. Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.

Madagaskaro. S-ro Justin Randriamampionona, Lot: VA 20-BA Tsiadana, 101, Antananarivo.
Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Malto. S-ro Anthony Mercieca, 20, Valletta Road, Quormi.
Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Pollando. S-ro Lech Kosiniak, ul. Piekna 16 b/g PL-00539 Warszawa

Portugallio. Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto, 6 R/C A, P-1500 Lisboa.
Jarabono: 260 esk.

Sovet-Unio. Alar Kihn, str. Hiiu 5—5 SU-200016 Tallinn, Estonio.
Jarabono: 5 rubloj.

Svedio. S-ro Tord Suard, Lingvagen 201, S-1235 Farsta.

Jarabono: 5 us. dol.

Usono. S-ro Roy McCoy, 371, Harvard Street Cambridge, Mass. 02138.
Jarabono: 5 us. dol.

Vjetnamio. Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107, Quan Thanh, Hanoi.
F-ino Vũ Thanh Huong, 20 Ly Thai To Vie Vien Ngon ngu hoc, Hanoi.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Vasil BOROVSANSKI, Dim itar ĤAĜIEV, Krastju KARUCIN.

Administranto — ASEN JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919: distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97 P. K. 66
1303 Sofio, Bulgario 1 000 Sofio
tel. 31-70-19
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

NI PAROLAS KOMUNAN LINGVON

(Vizito al Somera Esperanto-Tendaro)



En Lančov ankaŭ infanoj lernas Esperanton

Unu el la famaj feriaj regionoj en Ĉeĥoslovakio estas Vranov ĉe rivero Dyje, en la plej suda parto de Moravio. Belega barajlago, konstruita en 1930—1934, unikaj historiaj monumentoj...

La atento de la vizitantoj estas kaptita de la Vranov-kastelo. Ekde mateno ĝis vesperiĝo multe da turistoj atendas por trarigardi ĝin. Proksime, ĉe la vojkruĉiĝo al vilaĝo Lančov, apud la kastelo, estas speciala vojsigno. Sur blanka ŝildo — kvinpinta verda stelo kaj surskribo: SET — Somera Esperanto-Tendaro.

La esperantistoj el multaj landoj scias pri tiu ĉi loko. La tendaro estas por proksimume 170 feriantoj. Ĝi malfermas siajn pordojn jam 30 jarojn en julio kaj aŭgusto por ĉiuj, kiuj havas intereson pri la Internacia Lingvo. Ne gravas de kie ili alvenas ĉi tien, ili forlasas siajn gepatrajn lingvojn antaŭ la tendaraj pordoj kaj por du semajnoj estiĝas granda familio kun unu komuna rimedo por komunikado.

SET ĉe Vranova barajlago estas organizita de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sekcio de Sudmoravia urbo Trebič, kunlabore kun la Junulara Sekcio de ĈEA en Prago.

Al la tendaro nin gvidas Pavel Sittauer, instruisto en fundamenta lernejo kaj entuziasma esperantisto, unu el la fondintoj de la tendaro. Li eksplikas al ni: „La kursoj estas tri-etapaj — ĉiu daŭras du semajnojn. Tie ĉi estas diversnivelaĵ kursoj kun varia progra-

mo: kursoj por komencantoj kaj progresintoj; intensaj kaj konversaciaj kursoj; tradukistaj kaj instruistaj kursoj. Ĉiu vizitanto de nia tendaro devas partopreni iun el ili. Oni instruas Esperanton ĉiutage po 4 horoj. Unu el la lernohoroj oni dediĉas al kantado. La posttagmezoj estas liberaj: vojaĝoj, banado, diversaj sportoj, vesperaj interparoloj...

Malgraŭ ke la lecionoj daŭras duonon de la tago, Esperanto estas la ĉefa (kaj por la plimulto — la nura) komunika lingvo en la tendaro, kaj ĝi estas aŭdebla dum la tuta tempo.

Ni vizitis la tendaron, kiam la restado de la kursanoj tie estis ĉe sia fino. Tio signifas, ke la parol- kaj skribezkamenoj antaŭstaras. Nun la instruistoj preparas la temojn por la skribezkamenoj. Ili okazos aparte en la grupoj, post kio ĉiu partoprenanto ricevos atestilon.

En speciala grupo lernas la infanoj. Ili estas ĉi tie kun siaj gepatroj-esperantistoj. Al la plej junaj tendaranoj oni instruas Esperanton diversforme: per ludoj, kantoj, rimoj. La rezultoj estas bonegaj. „Mi estas Lucie. Mi loĝas en Prago.“ — diris al mi okjara knabineto. Kaj ŝi aldonis, ke ŝi certe venos al SET denove la sekvan jaron. Tiam ŝi lernos en dua-grada kurso.

Mi foliumas la tendaran kroniklibron kaj trovas multajn interesajn faktojn. Ekzemple, ĉu vi scias, ke multe da geedziĝoj ne ekzistus, se ne estis Vranova Esperanto-Tendaro? Sur unu el la lastaj paĝoj de la kroniklibro oni povas legi la bondezirojn de s-ro Wallace du Temple — kanadano kaj s-ino Olga du Temple-Valentová (ĉeĥino), kiuj renkontiĝis ĉi tie antaŭ dekunu jaroj kaj venis denove en 1982.

Agrabla kaj utila estas la restado en SET, kie ĉiuj parolas nian komunan lingvon Esperanto — la lingvo de paco kaj amikeco.

ADELA KRATENOVA
(Agentejo „Orbis“, Prago)

Sur la kovrilpaĝo: „PACO ENLOKIĜU EN VIAN KAPON! — afiŝo de la hinda pentristo A. Gagara, gajninto de diplomo en la Internacia Konkurso „La afiŝo en la batalo por paco, sekureco kaj kunlaborado“, okazinta en Moskvo, USSR.